

Etsuo Miyoshi

Por Egaleco kaj Paco!

La usona filozofo T. Pogge asertis, ke sciante pri la maljusta angla dominado de riĉaj landanoj, alpuŝi la anglan al la mondo samas kiel murdo kaj ŝtelado, la "rajto" uzurpi je la kosto de malriĉaj landoj, devas esti urĝega temo por reformi en la nuna mondo.

La belga politikerudito Ph. V. Parijs diris, ke nur la denaskaj angloj ricevadas komplezon, kio kreas maljustan mondon. Almenaŭ duono el la anglalandanoj devu pagi al neanglalingvanoj la kostojn por lerni la anglan.

Aliflanke, la kanada politika sciencisto W. Kymlicka opinias, ke la moviĝo de EU iom post iom limiĝas pro la anglalingva elito. Estas granda risko pri neniiĝo de la demokratia bazo, se oni ne diskutas pri socio, ekonomio kaj gravaj aferoj, inkluzive de aliaj decidoj, per ĉiutaga lingvo.

Laŭ lingva erudito R. Phillipson: forlasinte siajn koloniojn, Anglio kaj Usono profitis per politiko kaj komerco, el kio rezultis havado kaj antaŭenigo de hegemonia pozicio por la angla per nacia strategio! 1993: pro IMF-financaj kondiĉoj oni devis ŝanĝi la instruadon de la svahila al la angla, ktp.

Diversaj gravuloj jam konscias, ke la angla dominado ne bonas, tial necesas strategio por trafe kontraŭstari. Bonŝance E-mortintoj heredigis al UEA por la diskonigo de la Movado! Ni respektu ilian volon. Ŝancoj por esti aŭskultataj ekzistas. Ni povas aperigi 10-foje tutpaĝe la saman anoncon en la plej prestiĝaj ĵurnaloj en ĉiu EU-lando. Tio estos ja vetado, sed se oni ne vetas, nenia renversiĝo okazos.

Plie, ni memoru, ke en 1955 UEA translokiĝis al la havenurbo Rotterdam kaj nun troviĝas en donacita domo. Ĉu ne venis jam tempo nin demandi, ĉu efektive havenurbo estas la plej ĝusta loko por la sidejo de nia Movado?

Bruselo *de facto* estas la ĉefurbo de EU. Ĝi estas efektive la plej trafa loko por lobiado antaŭ diversaj politikaj instancoj de EU kaj ankaŭ ĉe NRO'j. Por profiti je tio, ne sufiĉas nur fojaj vizitoj al Bruselo, sed daŭre restadi tie kaj forte aktivi en la ĝusta loko. Ebloj por renverso de la monda ordo ekzistas kiel supre dirite, aŭ ĉu ni ĉiuj senesperiĝis kaj agas kiel hobiistoj?

Konsidere nian nunan forton, sufiĉus malgranda oficejo kun direktoro kaj sekretario. La aliajn servojn kaj produktojn de UEA oni transigu al landoj, kie kostoj estas konsiderinde pli malaltaj. En la tabelo sube estas nur kelkaj ekzemploj:

Aĉeto de plia domo en Rotterdam pli enradikigas nian Asocion tie kaj malfacile eblos moviĝi. Nun estas decida tempo por Bruselo kaj por bona utiligo de nia mono! Ni kune realigu la ludovikan revon! ... aŭ ĉu dormigi la monon en banko estas pli saĝe?

Dum duonjaro, mi rekte kontaktis 4 352 homojn el 121 landoj, el kiuj 66,5% estas UEA-membroj, la cetero estas Facebkook-anoj. Respondis 15,5%. Jen estas la rezulto, kiun mi deziras utiligi por la Movado en la estonteco kun la ĉefa celo daŭrigi la revon de Ludoviko:

Opinioj de respondintoj:

1. Ni devas esti liberaj esprimi nin en la revuo, ne kiel en diktatoreco.
2. Ĉ. duono poras retajn anoncojn.
3. Pli bone krei virtualan sidejon. Dudekkelkaj subtenas Pollandon. Post Brexit estos ebloj por E-o en EU.
4. Necesas adaptiĝo por ŝpari kostojn. UEA devus pensi pri malriĉaj landoj!

Ĉ. 90% aldonis komentojn, kiujn mi resumas jene: UEA stagnas, ne havas movadan politikon kaj ne celas la revon de Ludoviko. Pri tiuj 4 temoj oni devas oficiale iel diskutigi la Movadon.

Pro hobiismemo, la nuna UEA ne plene plenumas sian originalan taskon, aktiveco okazas ankaŭ ekster UEA kaj ĝi ne reprezentas la tutan Movadon. Ĝi similas al firmao kun memceloj.

	Minimumaj salajroj	Poŝto ĝis 50 gr.	Vivkosta Indekso
Nederlando	EUR 1 501	EUR 2,50	167 (Rotterdam)
Pollando	EUR 430	EUR 1,22	38,53
Brazilo	EUR 219	EUR 1,47	38,88
Ukrainio	EUR 48	EUR 0,05	28,56

Ĉu aperigi mian artikolon en la revuo Esperanto?



Ĉu aperigo de ĵurnalaj anoncoj?



Ĉu transloki UEA al Bruselo?



Ĉu transigi produktojn al malpli kosta lando?